

1<sup>a</sup> trimestro 2015

En tiu numero  
vi legos..



## LA NIMFEAJ ĜARDENOJ DE LATOUR-MARLIAC


*Ni vizitis la ĝardenojn de LATOUR-MARLIAC, jen la traduko de la notico, kiun ni ricevis por gvidi nin.*

### LATOUR-MARLIAC, ekde 1875

La nimfeaj ĝardenoj situas en Le Temple-sur-Lot en la regiono de Agen [aĝen].

### Senkompara historio

La plantidejo estis kreita en 1875 de Joseph Bory Latour-Marliac por la disvastigo, la kultivado kaj la komerco de la rezistpovaj nimfeoj kaj nufaroj. Antaŭ establi sian plantidejon Latour-Marliac sukcesis hibridiĝon de nimfeacoj per procedo, kiu restas mistera. La bezono ekzistis, ĉar en tiu epoko, la sola fortika nimfeo de Eŭropo estis la blanka nimfeo (Nymphaea alba). Krucante tiun blankan subspecon kun aliaj sovaĝaj, devenaj el Ameriko kaj aliloke, Latour-Marliac kapablis krei



kolekton de nimfeoj, nufaroj, kies paletro iris de delikata flavo al fuksio ĝis saturita ruĝo.

En 1889, Latour-Marliac sentis, ke lia kolekto estis sufiĉe impona por esti pre-



zentata en la Universala Ekspozicio de Paris, kiu okazis tiun jaron ; tiamaniere liaj plantoj de nova genro estis malkaŝitaj samtempe kiel la Eiffel Turo. Instalitaj en la akvaj ĝardenoj antaŭ la « Trocadéro » (1), la hibridaj nimfeoj, nufaroj sensaciis kaj obtenis la unuan premion en sia kategorio. Ankaŭ pli grave, ili allogis la rigardon de la pentristo Claude Monet, kiu miris kaj estis ĉarmigita. Iomete post tiu

(1) « Trocadéro » [trokadero] en la 16a distrikto de Parizo : Ĝi estis konstruita por la Universala Ekspozicio en 1878 kaj anstataŭigita per la nuna Palaco de Chaillot [ŝajo] okaze de la Universala Ekspozicio de 1937. La ĝardenoj kaj la placo Trocadéro estis aranĝitaj samtempe.

Jeannine kaj Gérard vizitis la Nimfeajn Ĝardenojn proksime al Agen.	p.1 ĝis p.5
Saliko, amikino de Jeannine kaj Gérard tradukis poemon.	p.6
De longa tempo ni ne legis la leterojn de Emile Bézier. Jen tre personaj konfidencoj. (La aliaj temoj eltiritaj de tiuj leteroj aperis en T.L. 25 ĝis 30.)	p.6 ĝis p.8
La solvo de la piramido proponita de Béren-gère estas...	p. 8

travivaĵo ĉe « Trocadéro », Claude Monet aĉetis la bienon de Giverny, kiun antaŭe li luis. Tiam, en tiu bieno, li ekkonstruis sian akvan ĝardenon.

Kiam la lageto estis finpreparita, Claude Monet mendis grandan kvanton da nimfeacoj al Latour-Marliac. La mendokuponoj aperas ankoraŭ en niaj arkivoj. Estas tiuj nimfeoj, kiuj devis esti la temo de liaj famaj pentraĵoj, « Les Nymphéas », nun eksponataj en la Mu-



zeo de l'Orangerie de Parizo. Oni miras, ke en la historiaj libroj pri la plej famkonataj pentraĵoj de Claude Monet, oni preskaŭ ne citas, eĉ ne mencias la rolon de Latour-Marliac en tiuj kreadoj. Tamen, oni povas apogi la ideon, ke Claude Monet pentris pli ol simplajn, belajn florojn : li sukcesis kapti sur la tolo botanikan novaĵon kaj liaj pentraĵoj troviĝas inter la unuaj vidaj reprezentaĵoj de koloraj nimfeoj kreskantaj en Eŭropo.

Ni multe ŝuldas al Joseph Bory Latour-Marliac, ne nur por la mirindaj nimfeoj, kiujn ni povas ĝui en niaj ĝardenoj sed ankaŭ por la inspira rolo, kiun li ludis ĉe sia amiko Claude Monet. Finfine, estas vere la du homoj, kiuj kune faris Francion la naskiĝloko de la « Nymphaea ».

## LA LOKOJ

### 1. Ateliero nimfeo

La ĉefa agado de Latour-Marliac, ekde sia kreado en 1875, ĉiam estis kultivado kaj perkoresponda vendo de nimfeoj. Hodiaŭ, tiuj post la mendo, ni rekte iras serĉi en la kultivbasenoj la plej



maturan rizomon por faciligi la kreskon de la plej junaj ŝosoj. Ni etikedas la planton ekde ĝia rikolto apud ĝia baseno por ne miksi la malsamajn subspecojn. Poste, ni ĝin abunde purigas enpakas en humidan paperon, metas en plaston saketon kaj en kartonan pakaĵon. La plantoj estas ekspedataj per « Colissimo », (2 aŭ 3 transporttagojn), sed la nimfeoj kapablas rezisti ĝis 15 transporttagoj dank'al la humideco de la pakaĵo kaj la fortika rizomstrukturo.

### 2. La « Victoria », giganto de



#### Amazonio

Tiu nimfeo, videbla ekde Julio, fakte estas alia speco de la « Nymphaeacea » ; ĝi disvolvas foliojn 1,50 m diametrajn en formo de « tartmuldilo » kaj 50 cm diametrajn dikajn florojn, kiuj nokte floras kaj kolorŝanĝiĝas. Tiu speco estas hermafrodita : la unuan nokton, la floro estas en ina stato kaj similas al peonio, ellasante fortan ananasodoron. La duan nokton, la sama floro iĝas maskla, je saturega rozkoloro kun stranga falusa formo. La floro estas polenita dum la unua nokto far speco de kokcinelo devena el Amazona riverego. Kiam la floro fermiĝas frumatene, la kokcineloj estas enkaptitaj interne kaj provante

forfuĝi, ili disŝutas la florpolenon. Tiu speco estis unuafoje kultivita fare de Anglo, Sro Paxton, ĉefĝardenisto de la duko de Devonshire, en la domo de Chatsworth kaj estas li mem, kiu nomis ĝin Victoria omaĝe al la reĝino.

### 3. La kultivbasenoj

Estas 65 basenoj ; ĉiu entenas 10 ŝelojn. Ĉirkaŭ 200 subspecojn de nimfeoj estas kultivataj ĉi tie, precize per la sama metodo uzita de S-ro Latour-Marliac en la 19a jarcento. Dum la vizito, vi certe renkontos amfibiajn amikojn ; la loko loĝigas 5 specojn de ranoj, kiujn oni enkalkulas per miloj.

### 4. La lotusoj

Botanike nomita *Nelumbo*, la lotuso karakteriziĝas per siaj dikaj altaj folioj kaj per siaj imponaj floroj similaj al dikaj peonioj. Tiuj floroj daŭras nur 3 ĝis 5 tagoj kaj al la florada fino, restas nur receptaklo aspektanta kiel ŝprucrozo. La lotusaj folioj, radikoj, grajnoj estas manĝeblaj. Tiu planto havas longan historion, kiel religia simbolo, speciale en Hindio. Tiuj plantoj povos kreski ĉie en Eŭropo, sed la sunegaj lokoj pli bone plaĉas al ili. En Eŭropo, la lotusoj estas popularigitaj de S-ro Latour-Marliac dank'al siaj mirindaj, fortikaj hibridoj.



### 5. La malnovaj basenoj

Tiuj basenoj, ankoraŭ uzataj por eksponi niajn kolektojn, estis konstruitaj en 1870 por ricevi la originan plantidejon. La rektangulaj

kultivbasenoj estis kreitaj por pligrandigi la entenecon ĉar la plantidejo estis kreskanta dum la 20a jarcento. Latour-Marliac atente konstruis sian plantidejon kaj tio estas videbla en la Novarta Stilo de kolektaj basenoj. La enmeto de tiu kolekto celas lokalizi kaj



identigi la preskaŭ 300 specojn, kiuj konstituas la Nacian Kolekton de Nimfeoj. La kolekto de fortikaj nimfeoj entenas, krom la specoj Latour-Marliac, la specoj de Slocum kaj Strawn, kiuj estas 2 usonanoj (Perry D. Slocum kaj Kirk Strawn) hibridistoj de la dua parto de la 20a jarcento. Nomita Nacia kolekto fare de la Konservatorio de Vegetalaj Specialigitaj Kolektoj (CCVS), la nimfea kolekto de Latour-Marliac estas unu el la plej kompleta en la mondo.



### 6. Potoj el bakita tero

Necesas scii, ke tiuj potoj neniam servis al plantado de nimfeoj sed nur al ĝiaj kultivo kaj zorgo. Ili estas lokitaj ĉirkaŭ la basenoj ekde pli ol 135 jaroj. Komence, necesegis, ke Latour-Marliac multobligu sian stokon kiel eble

plej rapide. La plej bona maniero sukcesi tion, estis malligi la rizomajn burĝonojn kaj meti ilin en akvon por elvolviĝo ĝis kiam ili ekproduktas radikojn kaj novajn foliojn, por poste esti replantotaj. Tiucele, tiuj potoj estis uzitaj kaj ili estas bonaj ujoj por la maturaj plantoj dum la rikolto. Tiuj terpotoj estis facile haveblaj en la 19a jarcento kaj malmulte kostaj ; tio klarigas la elekton de Latour-Marliac. Ili estas tipaj de sudokcidenta Francio, kie ili estis uzitaj en kuirejo por prepari kaj konservi interalie la kasuleton. Nun, nur kelkaj manlaboristoj daŭrigas la produktadon de tiuj potoj ; ni komisiis unu por krei la kopiojn, kiujn vi trovas en la vendejo.

## 7. La putoj

La unua puto, antaŭ la domo, estis fosita en la 19a jarcento de Latour-Marliac kaj ĝi ankoraŭ funkcias. La dua puto estis konstruita dum la 20a jarcento. Ili estas 7m profundaj kaj la akvo ĉerpita dank'al pumpiloj servas al plenigi niajn basenojn.

## 8. La muzeo Latour-Marliac

Konstruita en la departemento Lot-et-Garonne, en la plej malnova intakta forno por prunoj, nia muzeo celas ilustrati la vivon, la laborojn kaj la verkojn de S-ro Latour-Marliac. Ĝi prezentas la plej interesajn partojn kaj dokumentojn el niaj arkivoj konstituitaj de miloj da paĝoj. La heredaĵo de Latour-Marliac estas botanika, kultura kaj komerca. Liaj pioniraj laboroj pri la nimfeaj hibridigoj restas senrivalaj inter la hortikulturistoj ĝis nun. La fascino de Claude Monet por la koloraj kreaĵoj de Latour-Marliac permesis alkonduki liajn pikturajn reprezentaĵojn en la muzeojn de la tuta mondo kaj en la popola kulturo. Dank'al la komerca sageco de Latour-Marliac, oni estimas nun, ke ĉirkaŭ 70% de la nimfeoj en la monda merkato estas Marliac specoj, kreitaj ĉi tie en tiu plantidejo. La



kialo ? Latour-Marliac estis la unua homo, kiu hibridigis kaj vendis grandskale la nimfeojn, do, ĉiu plantidejo de akvaj plantoj, kreitaj en la 20a jarcento aĉetis sian bazan stokon ĉi tie. Se vi renkontas nimfeon, en via ĝardeno aŭ en pentrarto, estas ŝanco por ke ĝi estu rekte ligita al Latour-Marliac.

## 9. La tropikaj nimfeoj

Male al siaj fortikaj kuzinoj, tiuj specoj ne kreskas el rizomoj sed el bulboj. Ili eltenas nek la gelon nek la malvarmajn temperaturojn kaj devas esti traktitaj kiel jaraj plantoj en ĝardenoj aŭ devas travintri interne. La tropikaj nimfeoj estas famaj pro siaj enormaj, koloraj floroj. Inter tiuj koloroj, bluaj nuancoj, kiuj ne ankoraŭ estas malkovritaj ĉe fortikaj nimfeoj. La famkonata « Blua Lotuso » de Egiptio estas reale tropika speco de nimfeo, ne de lotuso, nomita « *Nymphaea caerulea* » ; vi trovos ĝin en nia kolekto.

## 10. La fontoj

Oni nombris 14 fontojn en la bieno kaj S-ro Bory Latour-Marliac uzis tiujn por la kultivo de tropikaj specoj. En 1908, jen tio, kion li priskribis : « La baseno de tiuj plantoj estas 16 m longa. Ekde Oktobro, oni enigas en ĝin akvon el abunda fonto, kies temperaturo estas konstante 12°. Ĝi estas kovrita per vitrokadroj por prezervi de la ekstera aero, la burĝonojn, kiuj elmergiĝas, kaj en tiuj simplaj kondiĉoj, delikataj specoj floras dum la tuta vintro. Ĉirkaŭ la fino de Aprilo, la vitrokadroj estas eltiritaj, la fonto estas devojigita por, ke la temperaturo de la basenakvo samiĝu kun tiu de la media aero. La nimfea vegetalaro, tiam, abunde, somere kreskas. »



## 11. La statuo de Latour-Marliac

Estas ĉi tie, laŭlonge la riverbordo, ke Latour-Marliac provis siajn unuajn krucaĵojn en duonbareloj. La estonta patro de la nimfeoj naskiĝis en 1830 en Granges-sur-Lot, situanta

kelkajn kilometrojn sur la vojo al Temple-sur-Lot. Li estis filo de Victoria Bory kaj de Guillaume Latour-Marliac ; lia familio havis



grandan bienon kaj lia patro estis farmisto kaj naturigisto. Kiam Latour-Marliac forpasis, liaj 2 infanoj Angèle kaj Edgar daŭrigis la plantidejon en Temple-sur-Lot. Lia filino Angèle edziniĝis kun Maurice



Laydeker, kaj ambaŭ prezervis la lokon, kie ili laboradis ĝis post la Dua Mondmilito. Poste, iliaj infanoj transprenis la entreprenon.

Ekde 1950 ĝis 1991, la familio Laydeker administris siajn aferojn de Bordeaux kaj la loka familio Maurel prizorgis la bienon ĉiun tagon. En 1991, la proprietaĵo estis aĉetita de "Britaj Stapeley Water Gardens", kiuj estis fonditaj de Ray Davies. Ray Davies kaj lia edzino Barbara persone entreprenis masivajn strebojn de restarigo kaj aldonis multajn aliajn karakterizaĵojn al la bieno. En 2007, la plantidejo estis reaĉetita far Robert Sheldon. Li, usondevena, havas longan sperton pri nimfeoj kaj akvaj ĝardenoj. Li estas ankaŭ pasia entreprenisto kaj erudiciulo pri la entreprenmenso. S-ro Sheldon travintras en Parizo, kie li estas profesoro kaj trasomeras en Le Temple-sur-Lot inter la nimfeoj.



## 12. La japana ponto

Situanta super la lageto, ĝi estas okulsigno al la japana ponto de la ĝardeno de Giverny de Claude Monet, de 1894, kiun li aranĝis kun la akvaj plantoj de Latour-Marliac.

## 13. La japanaj « koï » (karpoj)

Tiuj fiŝoj havas komunan punkton kun la nimfeoj ; de blankaj kaj grizaj specoj, ili transformiĝis en multego da koloroj, dank'al la detalega interveno de specialistoj, dum la 19a jarcento. Dum tiu periodo, en la regiono de Niigata (Japanio), rizokulturistoj notis, ke

inter la komuna karmo « *Cyprinus carpio* », estis tiu rara fiŝo oranĝe aŭ ruĝe makulita. Ili estis delikate rekuperitaj kaj kune breditaj dum multaj jaroj. Komence de la 20a jarcento, oficiala listo de tiuj fiŝoj kaj de iliaj koloroj estis kreita kaj tiam la « koï » aperis okaze de la Universala Ekspozicio de Tokyo en 1914. La spektantoj miris kaj estis ĉarmitaj. La « koï », ankoraŭ simbolas amon kaj amikecon en Japanio.



## 14. La bambuejo

Malmute da personoj scias, ke antaŭ iĝi famkonata pro siaj nimfeoj, Latour-Marliac estis unu el la ĉefaj spertuloj pri bambuoj en Eŭropo. Li aklimatigis nombrajn specojn el Ĉinio kaj Japanio, kies 2 ankoraŭ portas lian nomon : « *Phyllostachys nigra* 'Boryana' » kaj « *Phyllostachys bambusoides* 'Marliac' ».




*Vi povas pliscii pri la historio kaj trovi ĉiujn nimfeojn, memoraĵojn, donacojn rigardante : [www.latour-marliac.com](http://www.latour-marliac.com)*

*Jeannine kaj Gérard Layseman*

## Sufiĉas unu

(trovita en la reto, esperangita kaj titoligita de Saliko, 2015-01- 28

Unu kanto povas ŝalti la momenton,  
 unu floro povas veki revon,  
 unu arbo povas ekarbarigi dezerton,  
 unu birdeto povas antaŭmontri printempon.  
 Unu rideto povas ekamikigi,  
 unu manpremo levas la animon.  
 Unu stelo povas montri direkton al boato,  
 unu vorto povas reliefigi la celon.  
 Unu voĉo povas ŝanĝi la nacion,  
 unu sunradio lumigas ĉambron.  
 Unu kandelo elpelas la malhelon,  
 unu rido venkas mornon.  
 Unu paŝo komencos ĉiun vojaĝon,  
 unu vorto komencas ĉiun preĝon.  
 Unu espero levos nian animstaton,  
 unu tuŝo povas montri vian zorgemon.  
 Unu voĉo povas paroli saĝe,  
 unu koro scias kio estas vera,  
 unu vivo povas esti diferenca,  
 tio ja dependas de vi.



Pri la intima vivo  
 de la korespondantoj  
 de Emile Bezier

En la T.L. 25 ĝis 30 vi povis legi eltiraĵojn

de la leteroj senditaj inter 1930 kaj 1932 de Emile Bezier, esperantisto, kiu loĝis en Tours, al siaj germanaj korespondantoj : Walter kaj Linda, kiuj loĝis en Dresden. Jen frazoj, kiuj temas pri intimaj "aferoj". (mi kopiis ilin sen ŝanĝi eĉ komon)



Laŭ via letero mi vidas ke, por vi la vivo en Geising, estas sufiĉe agrabla kaj estas ĝojiga ke la belulinoj estu utilaj. Sed ne ŝercu tro kun la fraŭlinoj ĉar ..... ! (28-11-30)

Vi preparolas pri la bordelino mi konstatas, laŭ tion vi skribas al mi, ke la

mizero estas tie tre granda.

En Francio estas malpermesate ke la bordelulinoj eniru sur la strato peti virojn.

Vi devas kompreni ke mi ne vizitu tiajn lokojn, sed mi havas fraŭlajn amikojn kiuj, kiam estas feste, vizitas la bordelojn por amuziĝi, ili diris al mi, ke tie, la prezo estas multe kosta, ĉirkaŭ 30 frankoj.

Sed sur la stratoj estas multe da stratulinoj, kaj la plimulto inter ili estas malsanaj. Ankaŭ kelkaj junuloj kontraktas seksmalsanon (blenores).

Tamen la magistrato atentis pri tio, kaj vizitigis semajne la stratulinojn per kuracistoj sed bedaŭre ĉiuj ne estas vizititaj. (12-12-30)

Do, kara Walter, dum la kristnaskfestoj vi iris je via amikino, kaj sub la kristarbo vi ne enuis, ĉu ne !

Tio estas tiel bona, kiam oni sin amas reciproke, vivi kune.

Mia kara amiko, okaze de la nova jaro mi deziras al vi multe feliĉon, ke vi havu laboron, kaj (ke via kora amikino ĉiam amas vin). (8-1-31)

Pri tio kio la maljuna „fraŭlino“ diris al vi, kiam vi iris ĉe via amikino, la okazo estas malfacila por diskuti, kaj sufiĉe delikata por klarigi per letero.

Mia kara Walter, se tiel mi kredas vi volas edziĝi kun fraŭlino Linda, mi supozas, ke vi sufiĉe respektas ŝin, por ne postuli al ŝi ..... vi komprenas kion mi volas diri, ĉu ne !

Momente tio estas agrabla, sed ofte la seksaĵoj estas preskaŭ ĉiam timindaj.

Mia kara Walter, ne estu malkontenta pri tio mi skribas al vi, sed mi konsideras vin tiel frato, kaj se vere vi volas edziĝi kun fraŭlino Linda, (kaj via letero supozigas tion al mi, ĉar vi diras ke vi estas akceptita de ŝia fratino kaj de ŝia bofrato,) mi opinias kiel la maljuna fraŭlino : « Vi estas juna, fraŭlino Linda estas juna, kaj neniu scias kion povas okazi »

(Tamen mi ne estas ligna homo.)

... se kontraŭe vi ne volas edziniĝi kun fraŭlino Linda, ĉio ŝanĝas, kaj mi ne devas skribi pri tio.

Sed laŭ viaj leteroj mi opinias ke vi deziras kunedziĝi kune.

Se vi sciis, kiel mi estas kontenta, ke vi skribu al mi, pri viaj intimaĵoj, tio montras al mi ke vi konfidas je mi, kaj se kelkfoje vi enuis, skribu al mi pri tio, kaj mi faros la plej eble plej por konsili vin frate kaj laŭ la iama sperto, kiun mi havas pri la vivo. (18-1-31)

Kiam mi diras al vi : « se vi volas edziĝi kun fraŭlino Linda, mi supozas ke vi sufiĉe respektas ŝin, por ne postuli al ŝi ..... » Per tio mi volas diri : (mi petas vin pardoni al mi se mi parolas senkaŝe, neprude) « ke vi ne devas

postuli ke ŝi estu via amantino.

Mi scias kion vi diros al mi ; ke vi, ne perforte obligis ŝin esti via amantino, ke ŝi volonte fariĝis via amantino, ĉar ŝi amegas vin, tio estas tre bone. Sed ĉu vi pripensis, se fraŭlino Linda gravediĝus ? en kia pozicio vi estus ? ĉar bedaŭre vi estas senlabora.

Estas tio, kion mi volas diri al vi.

Mi tre bone scias, ke la virino estas kiel la viro pri la seksaj sentoj, kaj tio ne estas pro la moralo ke mi preparolis tiel, ĉar mi opinias ke la virino havas tiom rajtojn ol la viro, sed estas granda diferenco pri la seksaj rilatoj. Post la sekskunigo la viro ne timas nenion pri la sekvaĵoj, sed la virino riskas esti graveda. Ĉar malgraŭ, la tuta scienco, kiun oni posedas pri tio, al la pli lertulo tio okazas.

Nun pri la alia frazo : « se kontraŭe, vi ne volas edziĝi kun fraŭlino Linda, ĉio ŝanĝas, kaj pri tio mi ne volas skribi. » Per tia frazo jen estas mia penso : Mi ne konas fraŭlino Linda, kaj kiam mi skribis mian lastan leteron, mi ne sciis ekzakte se vi volis edziĝi kun ŝi, (nun ke mi scias ke vi volas edziĝi kun ŝi, mi ne skribos tian frazon.) do mi povas supozati ke vi vizitadis ŝin por vin amuzi, ĉar mi scias bone, kiam oni estas 24 jara, ĝenerale, oni ne estas ligna homo (same kiam oni estas 35 jara kiel mi). Do mi diris al vi : « ke mi ne devas skribi pri tio » ĉar mi opinias ke vi estas sufiĉe aĝa por agi laŭ via deziro en tia okazo. Ĉu vi komprenas min ?

Ankaŭ en Francio oni povas paroli senkaŝe pri tiuj delikataj aferoj, kaj la plimulto de la junaj fraŭlinoj estas ekzakte priinformitaj pri la seksaj rilatoj. (26-1-31)

Pri la afero fraŭlino Linda kaj vi, mi vidas ke vi ne agas sen pripensi kaj por la rimedoj, kiujn vi uzas vi nenion riskas.

(Sed atentu ke la gumprezervativo ne estu borita) (8-2-31)

Nun mi deziras al vi, ke neniam plu vi konu la senlaborecon, kaj tiel vi baldaŭ, povos edziĝi kun fraŭlino Linda. (7-5-31)

Certe vi estos multe pli trankvilaj en via no-

va loĝejo, ĉar tiel vi povos fari kion al vi plaĉas, neaŭdinte la fiparolaĵojn de la maljuna fraŭlino.

Eble vi povos loĝi ambaŭ en la ĉambro, ĉar, fakte, laŭ viaj leteroj, mi opinias vin kunvivantajn kiel se vi estus edzigataj. (31-10-31)

Do mia kamaradino Linda tute resaniĝis, pri tio mi estas tute kontenta, ĉar ni ambaŭ (mia edzino kaj mi) estis tute maltrankvilaj pri ŝia malsano, ĉar ni scias ke virino laboranta ne multe havas monon, feliĉe vi havis iom da mono, kaj vi povas ŝin helpi.

Laŭ la foto sendita de vi, mi konstatas, ke vi vivas en granda amikeco kun la fratino kaj la bofrato de Linda kaj tio helpas vin pasigi la longajn tagojn de senlaboreco. (31-10-31)

Nun iom pri vi. Laŭ la bela foto de vi sendita, mi konstatas, ke jam en Saksio multe neĝis, ĉar la arboj estas tute kovritaj de la neĝo sed tio estas granda ĝojo por mia karaj geamikoj Linda kaj Walter, kaj mi kredas, kiom Linda eliĝis el viaj brakoj ŝi estis tute pura, ĉar vi vigle lavas ŝin per neĝo. Vi pravas, amuziĝu ĝoje en la pura aero, la zorgoj jam vin trafis kaj, laŭ mia opinio, la promenado forpelas ilin.

Cu vi denove kartludis kun Sinjoro Bruno kaj s-ino Flora ! Ĉu s-ro Bruno havis pli bonan ŝancon ? Tute kore mi deziras tion al li, sed almenaŭ se li ne gajnas, tio ne devas lin malhelpi dormi. (29-11-31)

Parolu ni iom pri vi, ĉu vi ĉiam bone fartas ? Ĉu vi havas ŝufiĉe da laboro ? Tion mi esperas.

Ankoraŭ, mi esperas, ke vi estas tute kutima en via nova loĝejo, kaj nun vi povas mastrumi laŭ via volo.

Ĉu ne ! oni sin sentas bone kiam oni estas hejme, ĉirkaŭata de mebloj kiuj estas siaj.

Pri stenografio mi opinias ke vi lernos ĝin tiel rapide kiel vi lernis Esperanton.

Certe ĝi helpas vin havi laboron en skribejo, kaj tiel, vi povos meriti pli altan salajron ol tiu, kiun vi havas nun. (18-1-32)


*Sinjoro Harald Vogel sendis aliajn leterojn de*

*franca esperantisto : sinjoro Jean Castet, kiu loĝis en Le Perreux, proksime al Parizo. En ili mi legis interesajn anekdotojn, sed tiu persono estis multe malpli lerta ol sinjoro Bézier por skribi la esperantan lingvon. Do necesos korekti ĉiujn liajn leterojn.*

*Jacques Gaumé*

Por tiuj, kiuj ne sukcesis skribi literojn sur la ŝtonojn de la piramido de Bérengère, jen la solvo.

## PIRAMIDO



Preparu artikolojn por la venontaj Turangĝiaj Lukoj kaj donu aŭ sendu ilin al la grupanoj, kiuj kuniĝas ĉiujn merkredojn, tiel ili relegos kaj korektos ilin se tio estas necesa.

Centre Culturel Esperanto Touraine  
Halles de Tours  
Place G. Paillhou  
37000 TOURS  
Tel : 02 47 44 62 12  
esperanto-touraine37@wanadoo.fr  
<http://esperanto-tours.1s.fr>